FN PERANC 47


# NORMANDA ESPERANTO - BULTENO

BULLETIN TRIMESTRIEL - TRIMONATA BULTENO

Nº 29 - OKTOBRO 1974 .

Prizorgas : Pierre Lemarchand 43 rue Desseaux 76100 - ROUEN .
Eldonita de la Esperanto - Grupoj de la Ruena regiono.

- - - - - - - -

Sendu la manuskriptojn antaŭ la : 10a de februaro - 10a de majo - 10a de aŭgusto - 10a de novembro -


## LA LERNANTOJ FARIĜU AKTIVAJ ESPERANTISTOJ ......

Kiam vi ricevos tiun bultenon, novaj kursoj de Internacia Lingvo estos malfer-mitaj tra nia tuta regiono. Gratulojn kaj dankojn ni sendu al ĉiuj "bakantoj" de novaj samideanoj. Pli aŭ malpli da kursoj, pli malpli da lernantoj, ne gravas . La vera demando estas : " ĉu ĉi-tiuj malmultaj lernantoj fariĝos veraj esperant-istoj aŭ ne ? "

Depost la militfino, t. e. de 30 jaroj, ellernis Esperanton ĉiujare pluraj dekoj da personoj . Kie estas nun tiuj centoj da lernintoj ? Tralegite la adresojn de malnovaj listoj de ekssamideanoj, mi ofte demandis al mi : " Kial mi ne plu aŭdas pri tiu persono ? Kial tiu junulo kiu finlernis Esperanton kun entuziasmo ne plu estas inter niaj vicoj ? Kie estas tiu sinjorino kiu estis bona lernantino ? Kial la prezidinto de iu eksrondo de rùena ĉirkaŭurbo ne plu donas vivsignon ? Ktp...Ktp."

Ŝajnas ke la plej grava problemo ne estas propagandi por trovi gelernantojn sed estas interesigi sufiĉe la lernintojn por ke ili praktiku kaj entuziasmiĝu por nia idealo .

Multaj lernintoj post studado kaj akiro de eksterlandaj korespondantoj vizitas du aŭ trifoje niajn rondajn kunvenojn, pli aŭ malpli enuas dum tiuj kunvenoj, eble ne daŭrigas la korespondadon ĉar ili elektis seninteresan korespondanton. Tiam, sen ligiloj kun nia medio, ili rapide forlasas Esperanton, bedaŭrante la tempon perditan por lernado ĉar, por ili, Esperanto estis senpraktika.

Mi opinias ke oni ne devas mensogi al novuloj dirante ke, eksterlande, la espe-rantistoj estas multnombraj ke oni povas ilin renkonti je ĉiu stratangulo kun insigno ĉe la butontruo . Sed male oni devas ilin tuj informi ke nia lingvo estas praktikebla nur kondiĉe ke oni enviciĝu en la diversajn asociojn aŭ unuiĝojn de nia movado, nur kondiĉe ke oni abonu internaciajn gazetojn aŭ revuojn por esti informataj pri la diversaj kongresoj aŭ renkontiĝoj kiuj okazas ĉiujare kaj kiujn oni devas part-opreni plej ofte .

Ĉiu kursgvidanto instigu siajn novajn gelernantojn al membriĝo de asocio ekde la

.../...

... unua leciono . Ne gravas ke ili fariĝu anoj de U.E.A., de S.A.T., de katolika movado aŭ de profesia asocio; sed necesas ke ĉiu lernanto konsciu ke li devos aniĝi . Kaj atendante la momenton kiam li deziros elekti iun aŭ alian asocion, li jam eniru la vicojn de nia normanda unuiĝo kiu estas malfermata por ĉiuj kaj kiu estas taŭga loko por fratece interrilati kia ajn estu nia propra koncepto pri esperantismo .

U.N.E. ne celas konkurenci naciajn aŭ internaciajn organizaĵojn. Male ĝi estu nur ŝtupo por nacia aŭ internacia aniĝo; ĝi ĉiam instigu siajn membrojn al pli alta ŝtupo de esperanta vivo kaj al toleremo .

Eble, tiam, ni ne plu semos vane .

Petro KIJO .

---

## ESTRARO de UNUIĜO de la NORMANDAJ ESPERANTISTOJ

| | |
|---|---|
| Prezidanto : | S-ro QUILLAUD Pierre Côte d'Argent 2 av. René Coty 76120 Gd QUEVILLY |
| Vicprezidanto: | S-ro GIBAUX Jean 28 rue Raouul Dufy 76600 Le HAVRE . |
| Sekretario : | S-ro POTTIER Pierre 21 allée des roitelets 76190 YVETOT . |
| Kasisto : | S-ro JOUIS Edgard 621 rue Georges Mugnier 76230 BOISGUILLAUME. |
| Membroj : | S-ro LEMARCHAND Pierre 43 rue Desseaux 76100 ROUEN . |
| : | S-ro MARTIN Camille 14 rue du Pré d'Auge 14100 LISIEUX . |

---

<u>ESTRARKUNVENO de U.N.E. en YVETOT</u> la 9an de JUNIO 1974 ĉe S-ro POTTIER .

<u>Diskuto pri U.N.E. :</u> UNE estas ligilo inter ĉiuj Esperantistoj en Normandio , apartenantaj al iu ajn organizo, aŭ eĉ izoluloj. La ĉefaj roloj de UNE estas listigi la Esperantistojn kaj eldoni la bultenon.
Ni devas retrovi la forlasintojn kaj fari sliparon. Por tio ni sendos demandaron en la bultenon al ĉiuj Esperantistoj. Ges-oj GIBAUX kaj LEMARCHAND zorgos pri tio. Oni sendu tiun bultenon al ĉiuj konataj Esperantistoj, eĉ ne pagintaj sian kotizon.
Ni devos ankaŭ verki cirkuleron por instigi la Esperantistojn aliĝi al U.N.E. kaj artikolojn en la bulteno por ke ĉiu kursgvidanto sendu adresojn de siaj lernantoj.
Ges-oj Gibaux kaj Lemarchand kontaktos la prefektejon por enketi pri la nuna administra stato de U.N.E.
Ni sendos cirkuleron al la grupoj por peti, ke ĉiu grupo havu respondeculon pri informado, kiu sendu eltranĉaĵojn de ĉiuj gazetartikoloj pri Esp-o al sro Lemarchand.
Ni devos starigi cirkulantan ekspozicion.
Pri helpo al izoluloj aperos artikolo en la bulteno.
Ni devos starigi sliparon de la oficialaj instancoj por sendi informmaterialon.

<u>Pedagogia fako :</u>
Kurslibroj : publikiĝo en la bulteno de kompar-tabeloj de la diversaj metodoj.
Ekzamenoj : ili ne povas facile okazi dum la kongresoj. Estas preferinde organizi ilin ekster la kadro de niaj jaraj kongresoj.
Semajno de Internacia Amikeco : ni sendos kartojn eldonitajn de U.E.A. al la ĝemelitaj urboj, kie ekzistas esp-o grupo.

<u>Aktiva interna vivo :</u>
Ni devas instigi la grupojn inkluzivi la asocian kotizon de U.N.E. en tiu de la loka grupo.
Renkontiĝoj : ili estas dezirindaj, kaj povos okazi en la Domoj de la Naturamikoj en Val de Saâne aŭ en St Jouin Bruneval. Eventuale aŭtobusa ekskurso al Grésillon aŭ al Markola Kongreso.
Se eblas okazos estrarkunveno publika en les Andelys dum la kongreso de la Normanda Federacio de U.F.E.

.../...

...

Bulteno :

Ĝi povos enhavi kiel suplementon reklamilojn pri Esp-o libroj.
Ĝi devas ankaŭ raporti pri la komitatkunvenoj.
Sro Gibaux klarigas la problemon de la bulteno (malbonstata maŝino, tempomanko de sino Peltier pro malsano en la familio.)
La bulteno devas esti alloga kaj dinamika. Unu persono povas tajpi, alia presi, alia dissendi. Eble estas necese foje uzi la francan lingvon.

---

ESTRARKUNVENO de U.N.E. en GRAND QUEVILLY la 29an de SEPTEMBRO ĉe S-ro QUILLAUD.

S-ro Gibaux senkulpigis s-ron HUET kaj anoncis la decidon de s-ino LAVALLEE demisii pro sia aĝo.

Bulteno :

Oni tiam ekzamenis la problemon de la bulteno. S-ino PELTIER ne plu povas presi ĝin pro malsano en ŝia familio. La grupoj en Rouen kaj Grand Quevilly zorgos pri ĝi, sed la maŝino ne funkcias bone. S-ro Lemarchand bonvolas tajpi la stencilojn.
Oni bezonas presigi titolajn paĝojn. S-ino PELTIER provizore konservos la maŝinon, kaj ni presos per alia.

Sliparo :

Dum la ferioj s-ro Lemarchand sendis demandaron al la grupoj kaj starigis sliparon pri la Normandaj Esperantistoj.

Kotizo :

La estraro decidis altigi la minimuman kotizon ĝis 3 frankoj pro altiĝo de la prezoj kaj de la poŝtaj tarifoj.

Renkontiĝo :

La venonta Printempa Renkontiĝo kaj ĝenerala Kunveno okazos ĉe Domo de la Naturamikoj en VAL de SAANE la 10 kaj 11an de Majo 1975.

Administraj aferoj :

Nia asocio, deklarita la 11an de majo 1947 certe bezonas modernigon de la statutoj.
Ni pridiskutos tiun problemon dum la venonta estrarkunveno.
Ni devas antaŭvidi kampanjon apud la Ĝeneralaj Konsilantaroj de niaj normandaj departe-mentoj.
Fine oni fiksis la daton kaj lokon de la venonta kunveno : la 30an de novembro je la 14a horo ĉe S-ro GIBAUX en LE HAVRE kun, kiel tagordo :
Bulteno, statutoj, laborplano por la venonta jaro, printempa renkontiĝo.

---

## NIA VIVO EN ...............

VIRE : En tiu agrabla urbeto de departemento CALVADOS, Esperanto ĉiam estas, dank'al la aktiveco de Sro LEGRET, de Sro COLLEU, staciestro, kaj aliaj,....

Do, la 6an de junio 1974, Sro Legret kaj Sro JOUIS el Boisguillaume, tiutempe invitita de Sro Legret, akceptis gesinjorojn Mac LENNAN el EXETER (Anglujo), kiuj devis trapasi kelkajn tagojn en Vire.

Sro Mac Lennan tre ŝatas la VIRE-regionon, kaj oni denove admiris la urbon kaj la ĉarmajn verdajn ĉirkaŭaĵojn. Gesinjoroj Mac Lennan, kune kun sinjoroj Legret kaj Jouis estis akceptitaj de la loka ĵurnalisto de "OUEST-FRANCE" kiu faris tre favoran artikoleton kun taŭga fotografaĵo.

Gesinjoroj Mac Lennan poste ĉeestis la Internacian Renkontiĝon en la Kastelo Grésillon.

ROUEN : En Rouen, ĉiujare trapasas kelkaj alinaciaj geesperantistoj, precipe dum julio aŭgusto kaj septembro. Ili principe estas akceptataj de la tieaj esperantistoj, kiam la kunligo povas efektiviĝi, dank'al leteroj kaj telefono.

La lan de aŭgusto vespere ni havis la bonŝancon kunigi en la domo de nia amiko Michel COSSON kaj edzino, Bulgaran samideanon Petko ARNOUDOVI el Pazardjik, kun edzino Ludmila, Nederlandan Samideanon Rn. BOSSONG el Eindhoven kun edzino Katrih kaj 4 Ruenanojn : Sro JOUIS UEA delegito en Boisguillaume (apud Rouen), Sro QUILLAUD prezidanto de la Unuiĝo de la Normandaj Esperantistoj, kaj Samideano LOISEL, delegito en Rouen kaj edzino. Entute 10 kapablaj esperantistoj.

Estas interese scii ke sinjorinoj Arnoudovi kaj Cosson estas fratinoj el rusa deveno, kiuj edziniĝis pere de Esperanto.

Inter tiuj 10 personoj, oni povis uzi multajn lingvojn : francan, anglan, rusan, nederlandan, germanan,... sed nur per Esperanto, la konversacio povis esti ĝenerala kaj vigla !

Ni do pasigis tre agrablan vesperon, babilante en la internacia lingvo, kaj unu fojon plie, demonstraciis ĝian utilecon .

=-=-=-=-=-=-=-=-=

LE HAVRE :

Kursoj : malfacilaĵoj pro manko de ....profesoroj!
Tamen dank'al persista sindonemo de nia amiko A. CHAIM, la pozicio de la Esperanto - - fako ĉe la Junulara Kulturdomo (M.J.C.) plifortiĝas, kaj li tie malfermas elementan kurson. En Liceo Porte Océane, la sama gvidanto zorgos pri duagrada konversacia kurso.

Instancoj : sekve de la leterserio siatempe sendita al la kandidatoj-deputitoj, la estraro de la grupo organizis kolokvon por prezenti la Internacian Lingvon al politikulo . Ni bonŝance havis la partoprenon de germana Samideano dum tiu kunveno. Kelkaj paŝoj estis faritaj survoje al estonta prezento de Rezolucio por Esperanto fare de la Ĝenerala Konsilantaro.

Leningrado : Sro GIBAUX ricevis plurajn diskojn pri klasika muziko ĉi-foje. Li konigos la titolojn tre baldaŭ. Ni memorigas ke la vendado de tiuj diskoj permesas la transpagon de la kotizoj de niaj Samideanoj el la ĝemelita urbo.

=-=-=-=-=-=-=-=-=

YVETOT :

La 2a grada kurso finiĝis en junio kun 3 lernantoj, sed bedaŭrinde neniu el ili prezentiĝis al la ekzameno.

Dum aŭgusto familio POTTIER akceptis dum unu tago familion RENSCHLER en kiu la patro estas Germana, la patrino Itala kaj la 8-jara filo estas denaska Esperantisto.

La 5an de Oktobro okazis estrarkunveno de la grupo, kaj la ĝenerala kunveno okazos la 19an de oktobro. Ni havas la projekton de ekspozicio fine de oktobro. La kursoj malfermiĝos tuj poste en la Junuldomo.

=-=-=-=-=-=-=-=-=

Kial la posedanto de multaj katoj ĉiam estas malsana ?
... ĉar li havas kataron !

## Renkontoj kun germanaj Esperantistoj en la Demokrata Respubliko

Dum la lasta somero, nia Rouen'a amiko René DELAUNAY partoprenis vojaĝon organizi-ta de la asocio : Francio - G.D.R. Jen resumo de liaj interesaj spertoj :

La 2an de julio 1974, Sro Delaunay ekflugis el Le Bourget, per pola aviadilo, kun 15 Francoj. Post 1 ½ hora vojaĝo, la aviadilo alteriĝis en Berlin-Schönefeld.
Dum tritaga restado en orienta Berlino, en grandioza hotelo "Stad-Berlin" li vizitis la novajn kvartalojn kun larĝaj avenuoj.
La 4an de julio, Sro Delaunay plezure renkontis kelkajn germanajn esperantistojn. Sro Blanke DETLER, korespondanto de Sro GERRIER, informis pri la esperanta movado en G.D.R., kaj donis ekzemplerojn de la revuo "Der Esperantist".
La 5an de julio, Sro Delaunay iris per aŭtobuso ĝis KUHLUNGSBORN, ĉe la Balta maro kie oni afablege akceptis lin dum 10 tagoj en la ripozdomo Georges DIMITROV.
La 6an de julio, nia amiko havis la viziton de Sro KOSTER el la esperantista grupo en ROSTOCK. Kun li estis juna Hungara Esperantisto kiu laboras en la ŝipfarejo en Rostock. La tempo agrable forflugis en la salono de la ripozdomo. Sro KOSTER reiris al Rostock per la pitoreska vaportrajno ĝis Bad-Doberan.
La 10an , Sro Delaunay, respondante al invito, iris al Rostock kie la anoj de la Esperantista Grupo fervorege akceptis lin en ilia komforta sidejo. Oni manĝis, trinkis Tokay-Vinon, interŝanĝis donacetojn...Fraŭlino Sindelar HILDE, masaĝistino en kliniko donacis esperantistan flageton kun blazono de la urbo Rostock sur la antaŭa flanko.
Sabate, la 13an, nia amiko iris per aŭtobuso al la domo de kamarado KOSTER en WARNEMUNDE norde de Rostock. Sro KOSTER estis kun juna Soveta esperantistino, ĵus alveninte por libertempi, el KLAIPEDA (Litovio).
Oni promenis ĉe la marbordo, vidis hansajn domojn. Poste oni eniris la lignan domon de Sro KOSTER, kie la edzino, fervora esperantistino, atendis ilin.
Oni manĝis, ....kaj ne forgesis skribi sur la oran libron, jam plenegita per fremdaj subskriboj.
Post vizito de interesa foiro, nia amiko reiris al la ripozdomo, kie li daŭrigis agrablan restadon.
La esperantista renkonto ankoraŭ devis esti pli granda, sed bedaŭrinde kelkaj polaj gesamideanoj ne povis veni, pro malsano.
Sro Delaunay dankas tutkore la organizitojn : Gesinjorojn GERRIER kaj GILBERT kiuj permesis tiun kortuŝan renkontiĝon kun germanaj Esperantistoj.

-:-:-:-:-:-:-:-:-

## HELPO al TOGO - LERNEJO

Gesinjoroj JOUVIN en Grand Quevilly, kiuj organizis la Normandan Kongreseton en tiu urbo, lastan Marton, ankaŭ okupiĝas pri helpo al malriĉaj kolorfratoj en Afriko.
Sro Jouvin korespondas kun Togolandano 32 jaraĝa, Sinjoro Amadou MATHIAS, kiu instruas ĉe nomada lernejo "Zongo-Algabit" en TANOUT, Nigerlanda veprejo. Tiu homo tutkore deziras helpi la kompatindajn kamparanojn de tiu regiono, kaj multe oferis el sia propra mono, konstruinte dormejon por 100 infanoj, dispensarion por kuraci la multajn malsanojn de la popolanoj, grandan ĝardenon por kulturi legomojn, ktp...
Sed la ĉiama ĉefa problemo en tiuj regionoj estas la akvomanko. Tiu instruisto dezirus bori puton, sed tio kostus 22820 frankojn. Necesa ĝi estas, se oni volas bone kulturi, kaj elradiki la konstantan malsaton.
Dank'al la helpo de "Secours Populaire Français", li jam estas certigita pri la duono de tiu sumo, sed li devas kolekti la ceteron, kaj la situacio urĝas.
Sro Jouvin do petas ke se iu leganto de nia bulteno deziras kontribui al tiu bona faro, li sendu sian oferon pere de li. La poŝtĉekkonto estas :
Mr et Mme Pierre JOUVIN - CCP 102 45 P - ROUEN. Antaŭdankojn !

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

Kio estas la diferenco inter manĝanta bovino kaj malbona maristo ?

Nenia diferenco, sed simileco; Kial ?

ĉar manĝanta bovino re-maĉas kaj malbona maristo rem-aĉas !

**GRAND QUEVILLY :**

Post dissendado, fine de julio, de 10 000 flugfolioj (laŭ prezento de opinia sondado) interne de la loka senpaga gazeto "LE SIGNAL" en Grand Quevilly, Sro QUILLAUD malfermis kurson en la kadro de la laika amikaro Salengro-Bastié-Calmette, komence de oktobro. Bedaŭrinde ĝis nun malmultaj personoj enskribiĝis por la unuaj lecionoj.

Siaflanke Sro JOUVIN organizis nacian renkontiĝon de la Federacio Esperantista de Laboro en tiu urbeto la 20an de oktobro.

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

**NIA VIVO EN :** ĉifoje por nutri tiun rubrikon, ni ne ricevis informojn de CAEN, DOMFRONT, EVREUX, FECAMP, LISIEUX, TROUVILLE/DEAUVILLE Les ANDELYS , malgraŭ la fakto ke ni scias ke plejparte en tiuj urboj estas grupoj kuij estas viglaj .

Ni petas la diversajn grupgvidantojn sendi akurate antaŭ la fino de novembro raportojn pri la vivo de siaj grupoj al Petro Lemarchand (vidu la adreson ĉe la dua paĝo)

Kompreneble iu ajn povas sendi raportojn, sugestojn, kritikojn, informojn por la bulteno. Ni atendas viajn kontribuaĵojn. Antaŭdankojn !

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

**FILATELIA RUBRIKETO ........**

**Eldonado de francaj poŝt markoj ...**

2-9-1974 : Eldono de P.M. je 0,60 F: Turbintrajno T.V.G. OOI (en la serio de la Grandaj Faroj 1974.)

9-9-1974 : Eldono de p.m. je I,IO F Lot-valo (en la turisma serio)

16-9-1974 : Eldono de p.m. je 2,00 F Originala Verko de Miro.

23-9-1974 : d° 0,65 F Superregeneratoro Fenikso (en la serio de la grandaj faroj 1974.)

7-10-1974 : d° 1,20 F Centjareco de U.P.U.
d° 0,60 kaj 0,80 F Marianne de Bequet (en la serio kutima uzado.)

14-10-1974 : d° 2,00 F Baziliko de Sankta Nikolas de Port (turisma serio) 1,20 F Nikolas Kopernik.

21-10-1974 : d° 0,65 F Dazipo de la Gvajano (en serio "Por tektado de la naturo")

12-11-1974 : d° 2,00 F Verko de Sisley "Loing Kanalo".

18-11-1974 : d° 2,00 F Desegna drapiraĵo de Gobelins.
d° 0,80 + 0,15 F Johano Giraudoux
d° 0,80 + 0,15 F Barbey d'Aurevilly (serio famaj eminentuloj)

25-11-1974 : d° 1,00 F Rezist-medalo.

2-12-1974 : d° serio Ruĝa Kruco "La Sezonoj"
0,60 + 0,15 F La Somero.
0,80 + 0,15 F La Vintro.

M. BETTENCOURT .

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

Cu vi scias ke ...
en Norda Vjetnamio aperis pli ol 60 Esperantaj Libroj (amplek--santaj kune proksimume 9000 paĝoj) de 1959 ĝis 1973 . (Laŭ HOMO kaj KOSMO.)

## Du Normandaj Esperantistoj forlasis nin !

Ni ĵus sciiĝis, pere de Sino VINCENT, ke Fino CHERIE en BAYEUX (Calvados) eksinstruistino, kaj Sro BROISE, emerita Inĝeniero, en NONANCOURT (Eure), ne plu vivas. Ni eble ricevos pliajn informojn por la venonta bulteno.

:-:-:-:-:-:-:-:-:

## - 1975 - TURISMA KALENDARO;

Planu jam viajn venontajn feriojn kaj elektu !

| | | | |
|---|---|---|---|
| - JANUARO - | + 26/12/74 5/01/75 | . 18a Skiferio en Adelboden. Svislando. | .1 |
| - FEBRUARO - | + 15 - 22 | . 16a Internacia Fervojista Esp. Skisemajno. Plan Val Gardena apud Bolzano. Italio. | .2 |
| - MARTO - | + 15 - 16 | . Federacia Normanda Kongreso (U.F.E.) en Les ANDELYS. | .3 |
| | + 27/03/74 02/04/74 | . Renkontiĝo de J.E.F.O. en MANTES la JOLIE. | .3 |
| - MAJO - | + 10 - 11 | . Printempa Renkontiĝo kaj ĝenerala kunveno ne Unuiĝo de Normandaj Esperantistoj en VAL de SAANE (76) | .4 |
| | + 17.18.19 | . Nacia kongreso de U.F.E. en Tours. | .5 |
| | + 17.18.19 | . 53a Germana Kongreso en Oberkirch ĉe Nigra Arbaro. | .6 |
| | +25 . 26 | . 59a Brita Esp. Kongreso en Royal Leaminton Spa. Britio | .8 |
| - JUNIO - | + 28 - 30 | . 17a Kanada Esp. Kongreso en Calgary (Alberta) Kanadio | .9 |
| - JULIO - | + 4 - 7 | . 44a Norvega Esp. Kongreso en Tromsø. Norvegio. | .10 |
| | + 25/07/74 02/08/74 | . 48a Kongreso de S.A.T. en Hago, Nederlando. | .11 |
| | + 26/07/74 02/08/74 | . 60a Kongreso de U.E.A. en Kopenhago. Danio. | .12 |
| - AUGUSTO - | + 03 - 09 | . 31a Internacia Junulara Konferenco de T.E.J.O. en Herning. Danio. | .13 |

....................

Ne forgesu la internacian somerumejon Primoŝten kaj Grésillon.

Aliaj listoj aperos en la venontaj bultenoj de UNE.

Por havi kontak-adresojn pri tiuj renkontiĝoj skribu al

Petro LEMARCHAND
43 rue Desseaux
76100 R O U E N .

( Ne forgesu kunsendi poŝtmarkon por la respondo. Dankon, kaj agrablajn feriojn ! )

---

### En la venontaj bultenoj ni aperigos:

- kompar-tabelojn pri la diversaj, nuntempe aĉeteblaj kurslibroj en la franca lingvo, kaj vortaroj.
- liston de la diversaj Radiostacioj kiuj elsendas en la Internacia Lingvo.
- sekvon de la turisma kalendaro.
- listojn de entreprenoj, ĉu turistaj, ĉu komercaj kiuj laste eldonis esperantlingvajn faldfoliojn aŭ broŝurojn.

+.+.+.+.+.+.+

## - . KEIKAJ UTILAJ ADRESOJ . -

- 1 - UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE. (U.N.E.)

ccp : ROUEN 283 40.-H . (Nomojn de la respondeculoj vi trovos sur la 2a paĝo)

- 2 - FEDERATION NORMANDE des CENTRES CULTURELS ESPERANTO. (Normanda Federacio de U.F.E. )

Sino VINCENT rue des Oiseaux 27700 Les ANDELYS.

Telefono : 474. ccp : ROUEN 2348 06 C.

- 3 - UNION FRANCAISE pour L'ESPERANTO. (U.F.E.) Franca Landa Asocio de U.E.A.

4 bis rue de la Cerisaie 75004 PARIS. Tel. : 278 68 86.
ĉiutage de la 9a ĝis la 12a kaj de la 14a ĝis la 17a escepte de dimanĉe kaj lunde. Metrostacio : Bastille aŭ Sully-Morland.
ccp : 855 35 PARIS.

- 4 - JUNULARA ESPERANTISTA FRANCA ORGANIZO. (J.E.F.O.)

junulara branĉo de U.F.E. kaj franca sekcio de T.E.J.O.
vidu la adreson de U.F.E.

- 5 - UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO : (U.E.A.)

Nieuwe Binnenweg 176, ROTTERDAM 3002. Nederlando. Tel :(010)36 15 39.
ccp : 37 89 64.

- 6 - TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO. (T.E.J.O.)

junulara sekcio de U.E.A. Vidu la adreson de U.E.A.

- 7 - SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA. (S.A.T.)

67 avenue Gambetta 75020 PARIS. Tel.: 797 87 05. ccp : 1234 22 PARIS
Semajntage de la 8.30 - 12a horo kaj de la 13 - 18.30 horo.
Metrostacio : Martin - Nadaud.

- 8 - SAT - AMIKARO Franclingva sekcio de S.A.T. (Laborista Esperanto-Asocio)

vidu la adreson de S.A.T. en Parizo.

- 9 - FEDERATION ESPERANTISTE du TRAVAIL. (F.E.T.)

179 rue Ordener 75013 PARIS. Tel.: 252 19 36. ccp : 902 52 PARIS.

- 10 - ASSOCIATION FRANCAISE des CHEMINOTS pour L'ESPERANTO .

Landa sekcio de Internacia Fervojista Esperanto Federacio. (I.F.E.F.)
11 rue de Milan 75009 PARIS.
Koresponda adreso : 1 bis rue d'Athènes 75009 PARIS. ccp : 7402 60 PARIS.

- 11 - GRUPO de la ESPERANTISTAJ EDUKISTOJ. (G.E.E.)

Landa sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (I.L.E.I.)
Sro LE MAGADURE 23 rue Jules Ferry 56700 HENNEBONT. Tel : (97)65 24 21.

- 12- FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO. (F.K.E.A.)

Franca filio de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (I.K.U.E.)
Sro DESPINEY 43 quai de Champagne 94170 LE PERREUX./MARNE.

- 13 - NATURAMIKAJ ESPERANTISTOJ. ( T.A.N.E.F. )

Sro Gibert LEBEC 10 rue Jean Mermoz 94340 JOINVILLE le PONT.
ccp : 10 508 65 PARIS.

.../...

- 14- INTERNACIA ESPERANTO CENTRO de la MONDCIVITANOJ.

  Sino Renée VOLPELIERE 10 rue de la Servie 30000 NIMES.
  ccp : 1070 06 MONTPELLIER.

- 15 - CENTRE NATIONAL ESPERANTO-OFFICE.

  Sro Pierre DELAIRE 46 bis boulevard Alexandre Martin. B.P. n°2002
  45010 ORLEANS Cedex. ccp : 271 69 LA SOURCE.

- 16 - MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE . KASTELO GRESILLON .

  49150 BAUGE . Tel. : 34. ccp : 1485 39.

- 17 - EDITIONS FRANCAISES d'ESPERANTO . (E.F.E.)

  Sro RIBOT 11 rue Paul Vergne. 47200 MARMANDE. ccp : 30 900 BORDEAUX.

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

## L I B R O - S E R V O J

+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.

- 1 - UNUIGO FRANCA POR ESPERANTO : vidu la adreson supre
- 2 - SAT - AMIKARO : Bernard SCHNEIDER 38 avenue de la République 94320 THIAIS.
  ccp : 22 836 36 PARIS.
- 3 - FEDERATION ESPERANTISTE DU TRAVAIL : A. LAVERRE 12 rue Keufer 75013 PARIS.
  ccp : 25276 03 PARIS. Tel. : 580 58 61.
- 4 - MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE. KASTELO GRESILLON.: vidu la adreson supre.
- 5 - CENTRE NATIONAL ESPERANTO OFFICE : vidu la adreson ĉi supre skribitan.
- 6 - EDITIONS FRANCAISES D'ESPERANTO : - d° -
- 7 - UNIVERSALA ESPERANTO ASOSIO : - d° -

Petu la libro-listojn al la prizorgantoj, sen forgesi kunsendi almenaŭ du poŝtmarkojn por la respondo.

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

## P E R K O R E S P O N D A J K U R S O J .

+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+

- 1 - U.F.E. : rilatu kun la asocia sidejo en Parizo por havi precizajn informojn ekzistas elementa, meznivela kaj superaj kursoj.
- 2 - SAT - AMIKARO : unuagrada kurso : Clément MARTIN, La Violais 35310 MORDELLES
  ccp 824 51 RENNES. Prezo : 40,00 F. kun la libroj.
  - duagrada kurso : Roland LEVREAUD 18 rue Couraud 33240 Saint-André de CUBZAC. ccp 1237 41 BORDEAUX. Prezo 20,00 F.
    Speciala tarifo por gejunuloj ĝis 20j. : 10,00 F.
  - Kleriga fako : Roland LEVREAUD ; vidu supre.
- 3 - Fed. Esp. Travail : rilatu kun la asocia sidejo. Prezo : 50,00 F. kun kurs-libro, entenas la sendkostojn de la korektoj + donaca libro ĉe la kursfino.
- 4 - Kulturdomo GRESILLON : unuagrada kurso : 50,00 F. 16 libretoj + Korektoj.
  duagrada d° : 50,00 F. 14 Lecionoj + d° .
  triagrada d° : 30,00 F. Kurso + d° .
- 5 - Fed. des Cheminots Esp. : rilatu kun la asocia sidejo.
- 6 - Centre National Esp.-Office : Senpagaj kursoj ? Skribu al sinjoro DELAIRE por pliaj informoj.

.- &&&&&&&&&&&&&&& -.

## OFICIALAJ KOMUNIKOJ

Sciu bone ke :

- 1 - Ekde nun nova teamo en ROUEN kaj GRAND QUEVILLY, transprenis la torĉon.
Ni deziras ĉi-tie tutkore danki la HAVRAn Grupon kaj ĉefe sinjorinon PELTIER Kiu, malgraŭ multaj malfacilaĵoj, sukcesis daŭrigi akurate la eldonadon de nia Normanda Esperanto Bulteno ĝis nun. Gratulojn al ili !

Do kiam vi sendos artikolon por la bulteno, nepre ĝin sendu al Petro Lemarchand sufiĉe frue (vidu la titolan paĝon) por ke ĝi povu aperi en la venonta bulteno.
Bonvolu skribi klare kaj se eble per skribmaŝino. Antaŭdankojn !

Pro leĝaj aferoj, nur komence de la venonta jaro la titoloj :"édité et polycopié par" kaj " le gérant " ŝanĝiĝos.

- 2 - Estas absolute necese ke, kiam vi translokiĝas, vi bonvolu sendi al ni vian novan adreson. Tro da bultenoj revenas al ni kun la mencio : " N'habite pas à l'adresse indiquée."
Se eraroj estas en via adreso, bonvolu sendi al ni la necesajn korektojn.
Ni petas ĉiujn kursgvidantojn kaj grupestrojn sendi al ni la adresojn de la novaj lernantoj por ke ni sendu senpage al ili la bultenon, la adresojn de esperantist(in)oj kiuj ne ricevas la bultenon, kvankam ili en Normandio loĝas, eĉ se ili ne antaŭe pagis al U.N.E. sian kotizon.

- 3 - En la venonta numero de la bulteno kiu aperos fine de decembro, ni publikiĝos kotiztabelojn por 1975 de ĉiuj esperanto-asocioj: federaciaj, fakaj, naciaj kaj internaciaj.
Ni petas la diversajn perantojn de tiuj asocioj, ke ili sendu al ni, kiel plej eble rapide, la precizajn kotizojn.

- 4 - Tutsame, aperos en la decembra numero listoj de ĉiuj esperanto kursoj en Normandio, kun tabeloj pri la adresoj kaj horaroj de tiuj kursoj.
Ni petas la kursgvidantoj sendi ĉiujn utilajn informojn pri ili.

- 5 - Kiam via regiona, faka gazeto aperigas artikolojn pri esperanto aŭ pri io ajn kiu temas pri esperantaĵoj aŭ la monda lingva problemo, bonvolu sendi gazeteltranĉaĵojn kun la dato de la apero kaj la titolo de la gazeto al Petro Lemarchand, kiu kompilos ĉiujn artikolojn aperigitajn en la Normanda gazetaro.
Tiu repertuaro estas tre taŭga propagandilo kiam ni montras ĝin dum renkontiĝoj, kongresoj al oficialaj instancoj, ĵurnalistoj kaj al la neesperantista publiko.

- 6 - Ĉar nia asocio datiĝas de 1947, ni bezonas aktualajn statutojn por efike labori. La venonta estrarkunveno de U.N.E. pripensos tiun problemon kaj dum la ĝenerala kunveno venontjare en Val de Saâne, ni voĉdonos pri novaj statutoj.
Se vi jam havas ideojn, proponojn pri ili, sendu tion antaŭ fino de novembro al Petro Lemarchand kiu kompilos la diversajn proponojn.

- 7 - Tutsame, por agi serioze kaj efike, ni bezonas aktualan agadplanon realigeblan. Ni priparolos tiun problemon en Val de Saâne. Sed ekde nun sendu viajn opiniojn kaj proponojn al Petro Lemarchand.

- 8 - Bonvolu noti ke la venonta estrarkunveno de U.N.E. okazos en LE HAVRE ĉe sinjoro GIBAUX, la 30an de novembro kun tagordo : je la 14a horo.
- bulteno - printempa renkontiĝo - statutoj - agadplano - diversaĵoj.

- 9+- La venonta ĝenerala kunveno de U.N.E. okazos dum la printempa renkontiĝo en VAL DE SAANE (76) kiu situas apud TOTES, en la Domo de la Naturamikoj : "refuge de l'Hermitage" la 10an kaj la 11an de majo 1975.
Rezervu tiun daton por partopreni la renkontiĝon !
Pli precizaj informoj aperos en la venontaj bultenoj. .../...

– 10 – Pro la altiĝo de ĉiuj prezoj kaj ĉefe de la sendkostoj, la nova minimuma kotizo por 1975 estas 3,00 F., kiun vi bonvolu pagi al nia kasisto: sinjoro JOUIS pere de nia poŝtĉekkonto :

UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE : ccp ROUEN 283 40 H.

Tiuj kiuj ne ankoraŭ pagis por 1974 bonvolu tuj tion fari. Antaŭdankojn ! Kompreneble, ĉiuj mondonacoj estas bonvenaj ! kaj permesos sendi la bultenojn senpage al novuloj kaj al novaj lernantoj de la Internacia Lingvo.

+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.

## D E L E G I T O J de U . E . A

Laŭ la Jarlibro 1974A unua parto (nepre utila manlibro de la vera esperantisto .)

- 14100 : LISIEUX. sro MARTIN, delegito.
- 14360 : TROUVILLE HENNEQUEVILLE. sro TAILPIED, delegito.
- 14500 : VIRE. sro COLLEU, fakdelegito pri fervojoj.
- 27700 : LES ANDELYS. sino VINCENT, delegetino
  fakdelegitino pri instruado.
  d° pri internacia Mensa.
  d° pri religio Katolika.
  fino BONNET, junuldelegitino.
  fakdelegitino pri teatro.
- 76230 : BOISGUILLAUME.
  76000 : ROUEN . sro JOUIS, fakdelegito pri scienco.
- 76600 : LE HAVRE. sro CHAIM, fakdelegito pri informado.
  sro GIBAUX, delegito.
- 76130 : MONT SAINT AIGNAN. ŝro BERLOT, fakdelegito pri medecino.
- 76410 : SAINT AUBIN LES ELBEUF. sro CHAMARET, fakdelegito pri aŭtomobilo.
- 76000 : ROUEN. sro LOISEL, fakdelegito pri fervojoj.
- 76190 : YVETOT. sro POTTIER, delegito.
  fakdelegito pri instruado.

+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.

## ĈU VI SCIAS KE ..........

- ITALIO : 330 partoprenantoj el 21 landoj ĉeestis la 47an kongreson de S.A.T. en Bergamo.

La internacia oficejo de la itala Socialista Partio, informas pri sia intenco organizi en ROMO en septembro 1976 unuan kongreson de esperantistaj socialistoj.
(laŭ Sennaciulo)

- FRANCIO : La Franca Poŝtadministracio informas, ke nur la lingvoj germana angla, hispana, esperanto, franca, pola, kaj rusa estas allasataj por la redakto de gazettelegramoj destinataj al Polio.
(laŭ Sennaciulo)

- KANADO : La lingvoj franca, angla, esperanta estos la tri oficialaj lingvoj uzataj en la Internacia kongreso de " Ecole, Instrument de Paix " kiu okazos dum julio 1975 en Kebeko.

- FRANCIO : La Eŭropa Junulara Fondaĵo en Stasburgo asignis al T.E.J.O. subvencion de preskaŭ 60.000 F.F. por kovri parton de la elspezoj de la 30a Internacia Junulara Konferenco de T.E.J.O. en Munster kaj de ties seminario.
(laŭ Heroldo de Esperanto)

Ĉu vi pagis vian jaran kotizon al U.N.E. ?

## ĈU VI SCIAS KE ....

- La 10an de aprilo ĉi-jare la ĝenerala Konsilantaro de departemento GARD voĉdonis rezolucion favore al enkonduko de Esperanto en la lernejoj. Ĝis nun 22 Konsilantaroj esprimis saman deziron, nome tiuj de :

Allier – Ardèche – Bouches du Rhône – Charente –
Cher – Corrèze – Creuse – Dordogne – Drôme –
Eure et Loir – Gard – Haute Garonne – Gironde –
Herault – Isère – Lot et Garonne – Pas de Calais –
Pyrénées Atlantiques – Puy de Dôme – Rhône – Sarthe –
Val de Marne –

(laŭ Franca Esperantisto)

Kaj ni, en Normandio, kion ni atendas por ke niaj propraj departementaj estu en tiu listo ?

---

- **Laste aperis :** INTERNACIA KOMERCA EKONOMIKA VORTARO en 9 lingvoj.

Kompilita pere de Esperanto. Ĉirkaŭ 2000 specifaj nocioj kun klaraj difinoj en esperanto kaj en la angla lingvo. Krome nomoj de 200 landoj kun ties valutoj. Detalaj indeksoj. Formato 15x21,5 cm. Bindita 550 paĝoj.

Petu ĝin de via kutima libroservo !

---

- SOUVENIRS de L'AMBASSADEUR HARRY :

" En 1968, je suis arrivé à Saïgon comme ambassadeur d'Australie au Vietnam du Sud. En ce malheureux pays j'ai rencontré des espérantistes grâce à qui j'ai beaucoup appris sur la façon de penser de l'homme de la rue vietnamien. Parmi les espérantistes de Saïgon se trouvaient: un instituteur, un officier un ingénieur de Corée, des étudiants, des moines Boudhistes, un moine boud--histe allemand, des employés de la banque nationale.
Par ma collaboration à l'enseignement de la langue internationale et à l'or--ganisation des groupes, j'ai appris au Vietnam énormément de choses que mes collègues – les autres ambassadeurs – n'ont jamais comprises".

(laŭ la bulteno de SAT-Amikaro.)

---

**GRAVE ! : Al ĉiuj Normandaj Esperantist(in)oj !**

Kiel vi povis legi sur la antaŭaj paĝoj, la Estraro de U.N.E., VIA estraro kunvenis plurfoje por starigi agadplanon por nia Unuiĝo, kaj ankaŭ prizorgi ĝian organizan flankon... Ne kredu ke organizado estas lukso !

Bona organizado estas la bazo de ĉiuj dinamikaj entreprenoj.
Nia komuna entrepreno estas la disvastigo de Esperanto...
Hodiaŭ, ni petas de vi helpon :
1)- Vi bonvolu plenigi kaj resendi tuj la demandaron.
2)- Vi estu afabla instigi viajn konatajn samideanojn fari kiel vi.

DANKON AL ĈIUJ !

+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+

Tiu-ĉi bulteno estis eldonita de la esperanto-grupoj en ROUEN kaj GRAND QUEVILLY.
Prizorgis la banderolojn kun la adresoj sro GIBAUX el LE HAVRE.

+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+.+

Polycopié par le GROUPE ESPERANTISTE HAVRAIS DEPOT LEGAL : 3ème Trimestre 1974
La gérante : N. PELTIER.

/ TRES IMPORTANT / : Nous demandons à tous les Espérantistes de Normandie de faire l'effort minime de ne pas laisser sans réponse la présente circulaire; même si votre réponse devait être: "l'esperanto ne m'interesse plus, ne comptez pas sur moi."

L'ensemble de vos réponses permettra peut être à un petit noyau de fervents d'en-treprendre une action qui portera ses fruits, car nous saurons sur qui nous pouvons compter.

Si cette circulaire est écrite en français, c'est afin d'être bien compris des débutants, mais vous pouvez bien sûr répondre en Espéranto.

Si certaines questions vous embarassent, rien ne vous oblige à y répondre.

Si chacun voulait faire un petit effort, nous atteindrions les résultats valables que méritent notre Langue et notre idéal.

Ne vous enfermez pas dans votre tour d'ivoire.

Servez-vous de l'Espéranto, mais aussi servez l'ESPERANTO !

Nous vous remercions de vos réponses.

=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=-=

## A TOUS LES ESPERANTISTES DE NORMANDIE .

QUESTIONNAIRE à RETOURNER dès que possible à

Petro LEMARCHAND
43 rue Desseaux
76100 R O U E N

=-=-=-=

### 1) - FICHIER :

- Monsieur , Madame , Mademoiselle : (1)
- NOM :
- PRENOM :
- DATE de NAISSANCE :
- ADRESSE :
- CODE POSTAL : VILLE :
- TELEPHONE :
- PROFESSION :

### CONNAISSA NCE DE L'ESPERANTO :

- J'ai appris l'espéranto en 19.....
- Parlez vous facilement ....................... OUI NON (1)
- Pratiquez vous par correspondance .......... OUI NON
  par des rencontres avec des étrangers OUI NON (1)
- Etes vous abonnés à des revues esperantistes OUI NON
  si oui, lesquelles :
- Lisez vous souvent des livres en Espéranto OUI NON
- Ecoutez vous à la radio les émissions en espéranto OUI NON
- Avez vous l'impression de vous perfectionner OUI NON
  si non, puurquoi :
- Je possède les diplomes esperantistes suivants : ATESTO pri LERNADO (1)
  ATESTO pri SUPERA LERNADO — KAPABLECO
  PEDAGOGIA ATESTO — DIPLOMO pri ALTAJ ESP. STUDOJ

(1) veuillez biffer la mention inutile.

veuillez tourner S.V.P.....

.../...

## LE MOUVEMENT ESPERANTISTE.

- Je suis membre du groupe espérantiste de la ville de : ........
- Je suis membre de l'Union des Espérantistes de Normandie (U.N.E) OUI NON (1)

  Date d'adhésion : 19...
- Je suis membre de la Fédération Normande de Union Française Espéranto OUI NON
- Etes vous adhérent d'une association à l'échelle nationale OUI NON

  Si non, pourquoi :

(1) U. F. E. S.A.T.- AMIKARO FEDERATION esp. du TRAVAIL

J. E. F. O. Groupe Esp. de l'enseignement

Cheminots Autres Associations :............
- Etes vous adhérant d'une association internationale OUI NON

  U. E. A. S. A. T. T. E. J. O. FAKASOCIOJ /

  Autres Associations ............
- RENSEIGNEMENTS DIVERS :
  - Je suis délégué de l'U.E.A. OUI NON (1)

    dirigeant de groupe OUI NON Lequel :..........

    Je dirige un cours d'espéranto : cours du soir

    dans un établissement scolaire lequel :
  - Autres langues étrangères connues :

## UNION DES ESPERANTISTES DE NORMANDIE

- Veuillez inscrire toute suggestion, proposition, critique, opinion au sujet de la vie de l'U.N.E.
- Selon vous quel doit être le rôle de notre Union.
- Quelles devraient être ses réalisations pratiques :

  son information extérieure :
- Que pensez vous du bulletin.Adressez nous, vos critiques et vos suggestions.
- Avez vous déjà participé à un congrès regional de l'U.N.E. OUI NON
- L'esprit qui règne dans nos congrès régionaux vous plait-il. Si non pourquoi?
- Adressez nous vos idées pour l'éllaboration de nouveaux statuts et d'un programme d'action concret à réaliser dans les trois années à venir.
- Indiquez nous le nom et l'adresse des espérantistes qui habitent en Normandie et qui selon vous ne reçoivent pas ce bulletin. Nous le leur enverrons gratuitement.

Nous vous remercions pour tous ces renseignements !

=-=-=-=-=

(1) veuillez biffer les mentions inutiles.